7-a JARO, N-o 317

LEIPZIG, 30. / 10. 1930



ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

APERAS SEMAJNE	REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris 12e. – GVIDANTO: E. Lanti. – SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO DE SAT: 23, rue Boyer, Paris 20e. – ADMINISTREJO: R. Lerĥner, Kolmstrasse 1, Leipzig O 27 (Germanio).	APERAS SEMAJNE

BANDITA AGADO EN USONO

La aktuala atenco kontraŭ tre influhava k respektita "bandit-reĝo" Dajamond (Diamond) en Novjorko direktis la atenton de l' mondo al tiu usona apartaĵo, kiu reprezentas la tielnomataj "gengster"oj. Tial la sekvanta artikolo estos bonvena al niaj legantoj pro sia instrua k klariga enhavo. — Red.

Certe, en tiu ĉi rakonto ne ludas la fantomoj de Ŝerlok Homs *(Sherlock Holmes)*. Estas vivantaj personoj, kiuj havas detektiv-, polic-, juĝist- aŭ bandit-profesion. Kvankam la rakonto ŝajnas iom fantazia, ĉiu vorto, ĉiu frazo baziĝas sur sanga, malpura vero.

En komenco ekzistis la kapitalismo k la ekspluatata laborista klaso. La laboristoj organizis unuiĝojn por sia defendo, eĉ ili strikis por iom pli granda panakiro. La mastroj ja disponas pri la armeo k polico; sed alvenis tempo, kiam ankaŭ tiuj iloj ne plu tute sufiĉis al ili. En kunvenoj la laboristoj voĉdonas por striko, k ĉe la "pikedlinio" (linio antaŭ tiu ejo, kie oni ekstrikis, konsistanta el gardostarantoj, kiuj atentas, ke strikrompantoj ne povu eniri) ili persistis en siaj strikagoj. La fabrikestroj, por helpi la policon, ankaŭ organizis sian "milicon" el vagistoj k krimuloj. Ili enpenetris laboristajn kunvenojn, tie provokis interbatiĝojn, atakis ankaŭ la "pikedojn" (strikgvardion). La policanoj protektis ilin k arestis ĉe interbatiĝoj la sin defendantajn laboristojn.

En komenco ekzistis la kapitalismo k en ĝi fortaj bataloj inter diversaj interesgrupoj. Urbegoj kiel Novjorko k Ĉikago logis per multmiliardaj profitoj la kapitalistojn-konstruantojn k ankaŭ la — oficistojn, promesante grandegan profiton por pli malpotencaj entreprenoj k senliman rajton je trompoj k tiela monakiro. Multmilionaj negocoj de l' urbestraro, eta ŝtelŝanco de la angula polico. Ĉirkaŭ la profito, dekstre, maldekstre viciĝas konkurantoj, unuflanke la demokratoj, aliflanke respublikanoj, sed laŭbezone ili rapidege transkuras de unu partio al alia. Ekstere ili aspektas kiel unuecaj grandaj politikaj asocioj, kiel la "Temeni Hol" *(Tammany Hall)*, sed interne ekzistas batalegoj, kiuj sonas en la plej kaŝitaj demokrataj kluboj. Por akiri ian bonpagatan oficon, ili prenas tranĉilon k revolveron. Tiujn ilojn uzi estas tasko de l' "gengster" (dungita bandito). Ĉe okazo de ia giganta konstruado, kiam la akirota profito aspektas gigante, kreskas la konkurado inter la konkurantaj grupoj, kreskas la bezono je "gengster".

Tiam venis la "prohibicio", la alkoholmalpermesa leĝo. Vendi, aĉeti alkoholan trinkaĵon estis malpermesite, k tiu fakto 20-obligis la prezon de l' trinkaĵo. Mel'n *(Mellon)*, la financa ŝtatsekretario, ĉefa gardostaranto por la "prohibicio", ĝoje daŭrigis fabrike kuiri la trinkaĵon, tiel gajnante nekredeblan sumon. La alkohol-kontrabando fariĝis profitdona negoco. Centmiloj komencis ĝin kuiri k kaŝvendi. Kaj en tiu negoco ankaŭ eksplodis la fratbatalo. Por defendi la kuirfabrikojn, la alkoholsendaĵojn, oni bezonis "gengster"-legion.

Kaj ne nur la brando donis okazon akiri facile monsumegojn. Ankaŭ la viand-, ovo-, kortbirdar-, lakto-transportantoj, riĉuloj k eĉ pli malpotencaj parazitoj, batas unu la alian en siafaka konkurado. Ili dungis "gengster"-ojn unu kontraŭ la alia. Tiuj renversas, frakasas la veturilojn, la varojn, mortpafas la veturigistojn de l' konkuranto. Komence tiuj "genster-oj" estis maskitaj k havis falsan barbon. Ili loĝis en drinkejoj, unuvorte en "malsupra mondo", de kie ili elvenis nur, kiam estis "labor-okazo"; poste ili remalaperis. Sed laŭgrade kiel kreskis la nombro de "gengster"oj, k ili pli k pli estis nepre necesaj por laborist-persekutoj, "prohibicio" k aliaj fakoj, ankaŭ en la bataloj de l' politikistoj, ili forĵetis sian romantikan aspekton k iĝis elegantaj sinjoroj, kiuj eĉ ne forkuris post ia sanga atenco, sed kun fiero, nekaŝeme, ridetante iradis en la mondo de l' "superuloj", loĝis en plej elegantaj hoteloj, eĉ estis troveblaj ĉe kunvenoj, bankedoj, ĉe la dekstra flanko de l' riĉuloj. Kaj li fariĝis revolucia faktoro, la insidmortigisto, la honorinda "gengster"-bandito. Kaj fine, kial ne? Bankiero, fabrikposedanto, politikisto, generalo, uzure prenas miliardojn da dolaroj, trompas, ŝtelas, invalidigas milionamasojn de l' homaro k sendas al amastombejo, sed — ili restas eminentuloj estimindaj. Do kial li, la "gengster", ricevu mallaŭdon pro sia multe pli malgranda "plenumo"? La polico tute ne persekutas lin, eĉ ne minacas lin la karcero. En la meĥanismo de l' profitsistemo, bazita sur ŝtelo k mortigo, li ja fariĝis tre grava rado . . .

Antaŭ pli ol du jaroj oni mortigis en Bruklin (*Brooklyn*), urbparto Novjorka "gengster"-ĉefon Frank Jel (*Yale*). Kiel ĉiam, kiam falas kolono de l' societo, en la gazetoj aperis ĉefartikoloj, sonoris mil sonoriloj k miloj da funebrantoj ĉirkaŭis la ĉerkon. Oni metis Jel en arĝentan ĉerkon, lin, la banditan princon. Laŭ kronika noto en Usono tio okazis nur unu fojon ĉe morto de bankiero. Sekve "gengster" havas saman profesian gradon en la hierarkio kiel bankiero.

Duonjaron poste oni trovis mortigita alian "gengster"-suverenon,

Frank Marlo (*Marlow*). Ĉio similis la morton de Jel, escepte la arĝenta ĉerko. Ankaŭ tiam la polico ne povis trovi la murdinton, kvankam la atencinto estis konata, ĉar la ĉefpolico estis interligita kun la "gengster"oj same kiel la ordinaraj policanoj. Ambaŭ, "gengster"oj kiel polico, estas instrumentoj en la manoj de l' burĝaro. La "gengster"-mondo havas propran administracion, kun propra juĝdecido, en kiun miksiĝi polico ne havas rajton sen la volo de l' estroj. Tial post la atenco devis resti malkonata la atencinto. Kiel ĉe la trustoj la pli grandaj k pli fortaj frakasas la malgrandajn, tiel la "gengster"-ĉefoj forigas, murdigas la pli malgravajn "gengster"ojn, se ili ne obeas. Tiel verŝajne la "gengster"-reĝo de Ĉikago, *Capone*, forigis Jel k Marlo (suspekteble ankaŭ Dajamond aktuale! — *Red.*), por plilarĝigi sian novjorkan agokampon.

Antaŭ ioma tempo okazis festo por honoro de novjorka juĝisto *Vitale*, kiun partoprenis polico k "gengster"-oj. Dum la amuzoj envenis banditoj k devigis per revolveroj la ĉeestantojn fordoni monon, oraĵojn ktp. al ili. Vitale signis al la ĉeestanta detektivo, ke li ne uzu sian revolveron, k la banditoj forprenis ĝin. Post kelkaj horoj la detektivo rericevis sian revolveron el la mano de l' juĝisto Vitale! La ĉefpolico, eksciinte pri tio, ordonis esploron pri interligo inter la juĝisto k "gengster"oj. La vespejo ekzumis, ekstaris defendantoj de l' detektivo en la "malsupra" mondo. La esploro elmontris, ke la atako ne okazis pro monakiro, sed por havi papereton kun kontrakto, en kiu estis promesita de ĉefbandito Teranova 20 mil dolaroj por mortigo de l' "gengster"oj Jel k Marlo. Post plenumita laboro la bandito ricevis nur 5000 dol., sed Teranova promesis pagi la reston ĉe tiu festo, petante, ke la bandito venu tien kun la kontrakto. Li venis, sed samtempe ankaŭ okazis la atako de l' banditoj, kiuj forrabis la kontrakton. Certe la festo estis nur tiucele aranĝita, k Vitale bone sciis pri tio. Tiu juĝisto estis cetere unu el la fervoraj varbantoj por la demokrata urbestro Ŭoker (*Walker*), kiu dungas por pluraj trustoj. Tiel la cirklo kondukis nin de la "malsupra" mondo ĝis *Ŭol*-strato (*Wall*-str.), kie regas la financestroj de Usono!

Tiel finiĝas la rakonto: Ŭoker iris oficiale Ĉikagon por esplori la mortigon al Jel, sed efektive nur por evitigi grandegan skandalon, kiu povus ruinigi la bandit-fortikaĵon *Temeni Hol*, kio estus nek en la intereso de l' banditoj, nek en tiu de l' kapitalistoj . . .

L. Nagy (13 286), Novjorko.

A. B. F. — Kleriga Asocio de Laboristoj en Svedujo

(Fino. Vidu antaŭan n-on.)

La plej granda nombro el studrondoj estas lernejaj, kiuj por sia laboro havis instruiston kompetentan pri sia temo. Estas ĉefe lingvoj, k ni konstatas kun ĝojo, ke esperanto estas unu el la plej studataj temoj de la studrondoj. La ĉi-suba tabelo diras pli ol vortoj povas diri, pri la stato de nia lingvo en la asocio:

Studrondoj en fremdaj lingvoj:

	1927—1928	1928—1929	1929—1930
Esperanto	149	266	251
Angla	155	156	263
Germana	42	43	63
Franca	2	4	6
Rusa	2	—	1
Ido	2	2	—
Dana	—	—	1

La kaŭzo pri la granda plimultigo de l' angla- k german-lingvaj rondoj estas la ekspozicio en Stokholmo, kiu instigis multajn homojn fondi studrondojn sub la gvido de A.B.F. por havi ekzercon en la lernita lingvo. Plej multaj esperantaj studrondoj estis tamen tute novaj. Verŝajne montriĝos ankaŭ dum la nun komencita studsezono, ke la angla lingvo refalos al sia antaŭa pozicio k ke esperanto daŭre estos la unua lingvo ĉe la studrondoj de A.B.F.



La Gutahalo kun loko por 44 personoj

La korespondaj studrondoj studas per helpo de studleteroj el diversaj institutoj — plej multe tamen estas la studinstituto de Kooperativa Asocio, kiu gvidas tiujn studrondojn. La lekciaj studrondoj estas tipo da studrondoj, kiuj staras sub gvido de lekcisto. Li faras lekcion kun praktikaj ekzercoj aŭ interparolo kun la studrondanoj k laŭ liaj konsiloj oni plu laboras dum lia foresto. Revenante li donas novan temon k iom post iom la studrondo atingas rezulton. La universitataj rondoj estas tiaj, kiaj havas scienculon el iu universitato kiel gvidanton. Ilia studo estas ankaŭ pli profunda, k ne ĉiuj povas partopreni sen antaŭa studo pri la temo. Plej ofte estas socia ekonomio, scio pri ŝtata administrado aŭ komunumaj leĝoj k similaj temoj, kiuj okupas la partoprenantojn de tiaj studrondoj. Ili ĝuas ankaŭ specialan subtenon de la ŝtato. Dekunu tiaj rondoj agadis en la lasta jaro k ili ricevis de la ŝtato 11 800 kronojn.

La studhejmoj

Unu el la problemoj estis k estas ankoraŭ la ejoj por la studrondoj. La idealo estas, havi belan ejon kun skulptaĵoj, belaj bildoj sur la muroj ktp. La lernejaj ĉambroj ne bone decis al plenkreskuloj, sed multloke oni ankoraŭ uzas tiajn. Tamen en trideko da lokoj oni solvis la problemon tiel, ke oni konstruis specialan hejmon por la studoj. Plej granda k plej bela estas la studhejmo de Stokholmo, kie oni havas artaĵojn en la hejmo valoranta duonmilionon da kronoj. Artistoj donacis pentraĵojn k diversaj personoj donacis monon por plibeligo de la ejoj. Tiuj estas instalitaj por sia tasko. En Stokholmo la studhejmo posedas du lekci-salonojn, ĉambrojn kun lokoj por ĝis dudek personoj kun tabuloj k aliaj materialoj rilatantaj la studadon. Kune kun la hejmo troviĝas ankaŭ kafejo, kie la studrondanoj povas havi refreŝigaĵojn.

En kelkaj lokoj la fabrikestroj eĉ subtenis tiun laboron. En la malgranda urbo *Västeras* ekzemple la famekonata A.S.E.A. — elektra firmo — pagas la duonon de l' salajro por la gvidanto de l' tiea studhejmo, sen ia ajn kondiĉo. Ankaŭ en aliaj urboj, kiel *Malmö* k *Göteborg* A.B.F. posedas propran studhejmon.

Oni povas havi imagon pri la amplekso de la studlaboro de A.B.F., notante, ke ĝia bilanco por la jaro 1929—30 estis 634 827,43 kronoj (do proks. 190 mil dolaroj), ke pli ol 40 000 laboristoj partoprenis la studrondan laboron, kio nature okazas nur post la fino de l' taga laboro.

13 131.

ELSUDO **2-a eldono**

ABC de Sennaciismo

Provo prezenti la evoluon de internaciismo al sennaciismo per cito de socialistaj aŭtoroj k trakto de l' nacia problemo en Sovetio. Originalo, 60 pĝ. Form. 11×18 cm. Prezo 0,50 mk. g.

Administracio de SAT, Leipzig O 27

LA KLASBATALO TRA LA MONDO

El Polio

Plifortigita ondo de faŝismo havis kiel sekvon multajn novajn enkarcerigojn de K-doj k eĉ de neradikalaj opoziciuloj de l' reĝimo. La mallibero, por multaj, daŭras jarojn, eĉ tutan vivon. Tiel en la *Ravieca* malliberejo estas 117 K-doj, ukrainoj, blankrusoj, judoj k poloj, kies plej mildaj verdiktoj estas 4-jara puno; plej multaj estas kondamnitaj je 6 jaroj k pli. La estroj de tiu instituto ĉikanas ĉiel la K-dojn, forprenante la akiritajn rajtojn. Ili forprenis la tutan bibliotekon, malpermesis starigitan nutraĵ-komunon, ŝanĝis je malavantaĝo la promentempon. La malliberuloj batalis kontraŭ tiu agado per skribaj protestoj, rifuzo de manĝoj, frapado kontraŭ la klapoj de l' krado ktp. Pro plej etaj motivoj estis dekretataj individuaj punoj (izoligo, "malmola lito" k. a.). La manĝaĵo estas malfreŝa, sen graso, ĉiam griaĵo. Kuracista helpo preskaŭ ne ekzistas. Stomakmalsanuloj mortas pro la aĉa nutraĵo. Tiel mortis ekz. K-do *Levin* (9. 5. 30) post 6-jara malliberiĝo, malsana je koro k stomako.

Resumo laŭ tradukaĵo de Sapyr A.

El Litovio

Oni skribas en la gazetoj lastatempe multon pri novkonstruado de preĝejoj k malliberejoj. Pastroj kolektas monon inter la malprogresinta loĝantaro por starigi novajn preĝejojn en Kaŭnas, konstruinte jam tiajn en urbo Panevezijs. Novajn malliberejojn konstruis la registaro en Marijampolis, Utenaj, Rasejinaj, Zoresaj ktp.; malnovaj jam ekzistis por malfacilaj laboroj en Kaŭnas, Ŝiaŭliai k Panevezijs. Krome en Kaŭnas estas fortikaĵo por militistoj punitaj. Tio estas nia "progreso" en malgranda lando kun 2 milionoj da loĝantoj. *12 868.*

Subpremo al la maldekstra-tendenca teatraĵo en Japanio

La cenzuristo, timigita pro la impona sukceso de l' dramo "Suburbo sensuna", decidis apliki definitivajn metodojn kontraŭ la maldekstratendenca teatraĵo. "Nokto" de *Martine*, kiun oni intencis prezenti dum marto en la *Cukiĵi Teatreto*, estis detranĉita per cenzura tranĉilo ĝis plena neprezenteblo, same "Spiono k dancistino", kiu estis anstataŭe enprogramigita. Tia subpremo minacas per morto la maldekstran teatron, k la batalo kontraŭ ĝi estas rigardata kiel unu el la decidaj taskoj.

NE SENDU TRO LONGAJN ARTIKOLOJN! VERKU KONCIZE!

Leĝoprojekto pri laborsindikato en Japanio

La leĝoprojekto pri Laborsindikato, farita de l' Enlanda Ministerio, elvokis bruegan kontraŭstaron ĉe tutlandaj kapitalistaj grupoj. Ĉefaj mastraj sindikatoj kiel Japana Industria Klubo, Japana Ekonomia Ligo, Ĉambro de Komerco k Industrio, Teksindustria Federo k. a. kontraŭis ĉi tiun projekton en unueca fronto, nomante ĝin "klasbatala"; ili ne nur deklaris kontraŭon pri ĉefaj punktoj de l' statuto, sed plie projektas aparte leĝon pri laborstriko kun celo mortpremi strikojn. Al ĉio tio la registaro respondas, ke ĉe nekonvena okazo oni povas apliki la krim-leĝaron k "leĝon por defendo de l' ŝtatordo".

Se ĉiu laborista esperantisto

estus sufiĉe konscia por aboni al "S-ulo", ni ja ne tiom sentus la nunan nepago-povon de sovetianoj k povus senhezite plue eldoni 12-paĝajn n-ojn . . .

VARBU NOVAJN ABONANTOJN, POR KE NI POVU PLIAMPLEKSIGI NIAN GAZETON!

Striko en la Tokia muslinkompanio

En la Kameido-fabriko de l' Tokia muslinkompanio oni publikigis devigan hejmrevenon de 350 laboristinoj k 2-horan mallongigon de laborado je preteksto de ĝenerala ekonomia malviglo. Tuj 2200 gelaboristoj ekstrikis la 24-an de julio kun postuloj: kontraŭ la deviga hejmrevenigo al la laboristinoj k kontraŭ maldungo pro labormallongigo. La 28-an, post sinsekvaj intensaj batalaj tagoj, la kompanio deklaris provizoran ĉesigon de produktado k ordonis hejmrevenon al 1800 laboristinoj. La strikantaro kunligiĝis kun 1200 gelaboristoj el Kanemaĉi-fabriko k 1300 el Azumafabriko. Tiele la striko estos longdaŭra k disvastiĝos.

Laŭ "Scienco Proleta", n-o 10, Tokio.

Kreskanta mizero en Aŭstrio

Vienaj ĝardenistoj ekplendas pri nevendeblo de siaj legomaj produktoj. Ĉiutage ili devas forĵeti kvantegojn da spinaco k salato sur la sterkejon, kie tiuj legomoj forputras, ĉar neniu povas aĉeti ilin. Tiu fakto pli ol io ajn pruvas la progresantan mizeriĝadon de la Viena popolo. Legomo k bovoviando estis la tradiciaj manĝaĵoj de la Viena tagmanĝa programo. La viando ja pro la ega senlaboreco jam delonge nekonatiĝis por multaj laboristaj familioj. Nun ankaŭ la legomo iĝas nepagebla. Ke famaj kuracistoj precipe rekomendas la legomon kiel preferindan nutraĵon pro la enhavo de valoraj vitaminoj — tio ne gravas. La legomoj putru k laboristaj infanoj malsatu: beno de la dia kapitalisma mondordo. *F. S. (16 362), Vieno.*

Sovetio estas areno de grandioza konstruado

Skandinava, pola k germana delegitaroj, partoprenintaj la 5-an tutmondan kongreson de la Ruĝa Internacio de profsindikatoj (Profintern), post la vojaĝo tra Sovetio por konatiĝi kun la vivo laborista k kondiĉoj k cirkonstancoj de laboro, ĵus publikigis sian deklaron, en kiu estas dirite:

"Nur, kiam oni vidas per propraj okuloj, kiel en la tuta Sovetio progresas la industrio, superanta la industrion de ĉiuj kapitalistaj landoj; kiam oni vidas, kiel preskaŭ kiel fungoj post la pluvo kreskas industriaj entreprenoj, — nur tiam oni povas kompreni klare la tutan signifon de l' sovetia Kvinjarplano. Oni povas diri, ke USSR estas areno de grandioza konstruado. Per la sama rapido evoluas la sovetmastrumoj k kolektivaj kamparanaj mastrumoj.

Samtempe kun la konstruado de socialismo pliboniĝas la vivstato de l' proletaro.

Ofte oni povas vidi en Sovetio novajn fabrikojn, kiuj jam ekfunkciis, aŭ tiajn, kiuj estas nun nur konstruataj, kie laboras po 15—30 000 gelaboristoj. Novaj universitatoj, novaj loĝejoj same aŭ jam estas pretaj aŭ estas konstruataj. Aperas tute novaj industriaj regionoj, tute novaj urboj. Ni ne povas ne diri al la gelaborularo de l' tutmondo, ke ĉiuj informaĵoj de kapitalistoj k de iliaj lakeoj socialfaŝistoj[1] pri la stato en USSR estas malnobla mensogo. La bonan staton de Sovetio plej bone karakterizas la fakto, ke male al ĉiuj kapitalistaj ŝtatoj, kie nun estas 20 milionoj da senlaboruloj, en Sovetio nun estas ne unu senlaborulo. Male, en ĉiuj entreprenoj mankas laboristoj k USSR jam invitas laboristojn el kapitalistaj landoj. Ni ne pentrus plenan bildon pri Sovetio, se ni nenion dirus pri Ruĝa armeo. Ni tre ofte vizitadis la Ruĝan armeon. La lasta estas en Sovetio kulturkleriga institucio. La militinstruo ne estas

[1] Ni esperas, ke niaj socialistaj K-doj ne riproĉos al ni pro tio, ke ni ne forstrekis tiun frazon. Ili certe konsentos kun ni, ke la dokumento citita de K-do 2332 perdus iom da sia salo, se ni ne publikigus ĝin entute k senŝanĝe. Kompreneble ni ne tolerus tian tekston en ordinara artikolo. — *Red.*

malzorgata, kio meritas saluton, ĉar la imperialistoj ja pretigas novan militon kontraŭ USSR."

La delegitaroj vizitis Dagestanon, Azerbejĝanon, Georgion (Gruzion) k. c. En ĉi landoj la popoloj estis precipe premitaj de l' carismo, ĉefe estis subpremita ilia nacia volo. Dank' al Oktobra revolucio ĉiuj ĉi malgrandaj popoloj akiris plenan memstarecon (aŭtonomion). Ĉi aŭtonomaj respublikoj, aŭtonome regataj eniras la konsiston de USSR, konservas k evoluigas sian nacian lingvon k estadon. La plialtiĝo de l' industrio en tiuj landoj ĉi tie ankaŭ estas tre rimarkebla. Tion ĉi necesas substreki, ĉar la carismo nenion faris por progresigi tiujn landojn, k ili estis nur agraraj kolonioj.

La delegitaroj konkludis, ke la progreso de Sovetio por la utilo de l' laborista klaso estis ebla nur ĉe la kondiĉoj de l' diktatoreco de l' proletaro. Tiu ĉi konvinko, tiuj ĉi pruvo k faktoj devigas la delegitojn de l' 5-a profsindikata kongreso tutmonda per ĉiuj fortoj realigi la decidojn de l' kongreso akiri la plimulton de l' tutmonda Proletaro, organizi ekonomiajn k politikajn batalojn k gvidi ilin havante celon neniigi la kapitalismon k organizi la diktatorecon de l' proletaro en la tuta mondo. 2332 (Kremenĉug).

Se vi volas legi bonan prolettendencan literaturon en esperanto, abonu al

LA NOVA EPOKO

monata organo de SAT!
Unuopa kajero 0,35 mk. g.

LA REVOLUCIO EN BRAZILIO

Brazilio estas, kiel oni scias, grandega lando, kontinento per si mem, etendiĝanta de la ekvatoro ĝis la moderaj zonoj, sed ĝi estas vere surloĝata k kulturata nur sur tute malgranda parto de sia surfaco. La ŝtato Sao Paŭlo estas la bazo de l' ekonomia vivo brazilia, ĉar ĝi estas la kafregiono. Dank' al S. Paŭlo Brazilio estas la plej granda kafproduktanto; la kafo formas tri kvaronojn de ĝiaj eksportoj, per kiuj la lando vivas. Tial la ŝtato S. Paŭlo fakte regas Brazilion, pli vere la tieaj posedantoj de kafplantejoj. Aliaj estas la situacio en sudo, kie kutime troviĝas nur malgrand-bienistoj, et-posedantoj, kolonistoj enmigrintaj. El tiuj regionoj (*Rio Grande do Sul*) elpaŝis la nuna movado, kiu estas ribelo de ĉiuj nekafplantistoj kontraŭ la superregado de l' kafplantejestroj. *C. P.*

HAVI KURAĜON, RISKI LA VIVON

La homa vivo ofte similas al maro. Tiel glataj, kiel estas glata spegulo, estas de tempo al tempo la ondoj, k multfoje la ŝtormoj komenciĝantaj levas sin super la akvaro. Ho ve, tiam, al la homo, al kiu mankas fido! La vivo ne estas tiel facila, kiel multaj opinias. Multnombraj estas ĝiaj devoj, malfacilaj ĝiaj postuloj k neresumeblaj ĝiaj kontraŭdiroj. La homo, kiu volas kontraŭstari la malfacilojn de l' vivo, kiu volas esti kapabla por ĝia tasko k batalo, devas unuavice havi kuraĝon por riski la vivon. La homo, al kiu mankas tiu kuraĝo, tuj pereos sub la premo de la malsukceso.

La maniero, laŭ kiu ni mem agas k laboras, fiksas multrilate la vojon, kiun prenas la fluo de nia vivo. Estas vere, ni ne povas ĉiam malhelpi, ke la malprospero, ĉagrenego, aflikto eniras nian domon, same kiel la maristo ne povas malhelpi, ke vento k ŝtormo estas de tempo al tempo malsukcesigaj por li, k ke lia ŝipo iom post iom estos repelata al la bordo. Sed same senrespondece agus tiu maristo, se li ne uzus ĉiujn siajn fortojn por kontraŭremi la fluon k klopodi ĝis la lasta momento eviti la mortdanĝeron; same senrespondecaj estus ni, se ni ne per kvieta kapo, fera volo k ŝtala obstino faradus tion, kion ni laŭ la deziro de l' konscio povos por levi nin super la premo de l' malsukceso. Riski ĉion ĉi povos nur homo, kiu fidas.

La homo de la fido staras neŝanceleble meze de la danĝeroj, ĉiam daŭrigante, ĉiam laborante por sia devo; la homo sen fido perdas sian energion, k kiam la ŝtormoj komenciĝos, kaptas lin la timego, pensas li jam, ke li estas tute perdinta sin mem, dum multfoje ankoraŭ estas tempo, per montrado de kuraĝo k obstino, fordeturni la minacan danĝeron. En

Memoro je la 15-a de julio en Vieno

(Daŭrigo. Vidu n-ojn 312, 313, 315, 316)

Ĉirkaŭ la dekkvara, tuj post la unuaj salvoj, vundito formovis sin rampante sur la trotuaro antaŭ la justecpalaco. Pluraj policanoj celis genuflekse al la vundito k mortpafis lin.

La 16-an de julio la sanitaruloj instalis helpejon en la angula domo de *Rozenŝtajngase* k *Lobenhaŭergase*. Jen aperis polica patrolo k ekpafis al la pasantoj, kiuj hazarde iris en tiu strato. Unu sanitaristo k du nekonatoj estis mortpafitaj. Inter la multaj grave vunditaj, kiuj viktimiĝis en tiu pafado, estis ankaŭ ĉefflegantino de *Brigita-hospitalo,* kiu ricevis pafon en la bruston tra fermita fera rulaĵo de butiko.

Proksimume je la deksesa la stratoj antaŭ la germana popolteatro estis plene trankvilaj. Estis nur scivolemuloj, kiuj rigardis la bruladon de la justecpalaco k la savlaboron de la fajrobrigado. Marŝanta polica patrolo haltis k sen averto pafis al la stratpasantoj. La seruristo *J. Hak (Hack)* ricevis ventropafon, la seruristo *A. Ŝvab (Schwab),* kiu helpis forporti la vunditojn, ricevis trapafon de la maldekstra femuro.

Vendrede, je duono post la deksesa, la polico ekpafis al pasantoj, kiuj iradis ĉe la kruciĝo de l' operejo. Al sinjorino *Krojcer (Kreuzer),* kiu ĝuste transiris la straton, la kolo estis trapafita, la vertebro vundita k sekve ŝi restis paralizita.

Je la dekkvara maljunulo sidis sur benko en *Ŝmerlingparko.* Polica patrolo pafis salvon al la viro. Li falis, trafite en la maldekstran dorsan flankon. Ses homoj kuris por levi lin. Tiam la polico pafis al tiuj ses, kiuj estis ĉiuj grave vunditaj; unu el ili mortis pro siaj intestaj vundoj. Dua ricevis mortigan pafon en la kapon. La aliaj kvar ricevis pafojn en la bruston k aliajn vundojn.

Antaŭ la socialdemokrata advokata komisiono la kuracisto d-o Karlo *Kaŭtski (Kautsky)* protokole deklaris, ke, kiam li kurace asistis en la policejo *Elizabetstrato,* li aŭdis, ke juna policano diris al alia policano fanfarone, ke li pafis junan "hebreon", kiam post la voko: "Se ci moviĝas, mi pafos", tiu faris movon.

Malgranda aro da defendliganoj starigis sin antaŭ la policejo *Liĥtenfelsgase,* por protekti la policejon. Jen aperis de *Fridriĥ-Ŝmit*-placo svarmlinio da policanoj, kiu minacis per pafo. La homoj, kiuj staris antaŭ la policejo k ankaŭ la defendliganoj forkuris. Kiel lasta kuris iu defendligano. Pluraj policanoj sin ĵetis post lin k batis lin per la kolboj de la fusiloj tiom fortege sur la kapon, ke oni povis aŭdi la batojn malproksime. La viro teren falis k kuŝis kelkajn minutojn svene. Kiam li denove volis leviĝi, la policistoj batadis lin fusilkolbe sur la bruston, dorson, vizaĝon, k unu el ili larĝe svingante batis lin sur la postkapon.

La studento *Raŭhinger* alvenis je la dua horo al Lastenstrato. Jen krakis salvo. Li kuris, faletis k teren falis. Policano direktis la fusilon kontraŭ lin je distanco de du metroj k pafis. Sed evidente la kartoĉoj estis forpafitaj, ĉar ne okazis pafo. Nun la policano eksvingis la fusilon k per la kolbo bategadis la kapon de la sur-


la plej grandaj momentoj de l' vivo, en tiuj momentoj, dum kiuj la penso al la devoj, kiujn donas al ni nia vivtasko, estos tre klara en nia spirito k la ekzemplo de tiuj, kiuj per kuraĝo k obstino sciis supervenki la plej grandajn malfacilojn k kontraŭdirojn ravos nin, kaptas nin ofte sankta pasio. Tiam ni estos vidintaj nian idealon k ravite per tiu rigardo ni ne povos forflugi pro tiu instigo de nia sento kiu devigas nin pli proksime atingi tiun idealon, havi ĝin k realigi ĝin en nia vivo. Tiam ni decidos, ni agos k volos pruvi, ke ni estas potencaj por kontraŭstari niajn kontraŭdirojn k esti venkuloj en nia vivbatalo. Estos kvazaŭ tiuj, kiuj antaŭiris nin, alvokus nin, por sekvi ilin. Ni ne nur klarigos, ke ni faros tion ne nur travibros nin la plezura volo k la fajra deziro esti unuigotaj kun tiuj, kiuj neniam melankoliiĝis, sed ni komencos niajn unuajn paŝojn por sekvi ilin. Danĝeroj, antaŭ kiuj ni pli frue estis reirintaj kun frapanta koro, ŝajnas tiam ne plu ekzisti. Kiel agrablegaj estos tiuj momentoj, en kiuj la fido altigos nin k donos forton, en kiuj la idealo pri la morala perfektiĝo penetros klare en niajn cerbojn, en kiuj ni havos sanktan deziron por pliproksimigi ĝin! Sen fido, sen pasio, la homo ne superos la malfacilojn k kontraŭdirojn, rilate al sia vivtasko!

Ni SAT-anoj klopodu akiri la tre bezonatan fidon!

Kompiltraduko laŭ urba gazeto de *Truus Vreewyk.*

10-jara ekzisto de la popolaltlernejo Drajsigaker[1] (Tridekkampo) en Germanio

Je la 16-a de septembro 1930 okazis la 10-a jubilea festo de supre nomita popol-altlernejo en la rondo de l' 19-a kursanaro. Multaj gastoj, kiuj grupiĝis el la pasintaj kursoj, ĉeestis la feston. En simplaj, impresplenaj formoj, je konsidero de la nunaj malbonaj ekonomiaj cirkonstancoj (speciale la financaj rilatoj de l' popolaltlernejo) estis okazigita soleno, dum kiu iamaj



Popolaltlernejo Drajsigaker: Ĉambro de lernantoj

lernantoj k nunaj instruistoj rememorigis al la ĉeestantoj la unuajn historiajn paŝojn ĝis la nuna stato k la necesegon de tiaj popol-altlernejoj por junaj proletoj. En humora parto estis prezentita de kelkiuj el la 19-a kursanaro per siluetbildoj la historio de la lernejo.

Ĉi tiu instituto, sendependa de iu partio, estas lokita en la Turingia lando (proksime de la bavara limo), kie nun regas la faŝista intern-ministro Frik *(Frick).* Ĉi tiu intencas nuligi la kontrakton ŝtatan je la 30. 9. 30.

Antaŭ dek jaroj estis fondita de la nun fama pedagogo s-ro Vajtŝ *(Weitsch)* la popol-altlernejo Drajsigaker, kiu antaŭe estis punlaborejo. Ĝi estis la unua tiuspeca post la mondmilito en Germanio. Post ĝi ankoraŭ fondiĝis kelkaj dekoj da popolaltlernejoj.

Drajsigaker sukcesis okazigi ĝis nun 19 kursojn 4-monatajn por la junularo de l' socialista k revolucia laboristaroj. Ĉiu kurso konsistas el 30 junuloj aŭ junulinoj k pritraktas jenajn temojn: Ekonomio, sociologio, politiko, juraj demandoj, arto, vivdemandoj, ekzercado en libera parolo k teksta stilarto; k semajne okazas 2 literaturvesperoj pri ekonomio-sociologio-beletristiko. El la kolektitaj demandoj de la kursanaro estas kunmetata la instruplano pri la nomitaj sciencaj kampoj de la instruistoj, k la kursanaro poste decidas pri ĝi. Ĉi lasta elektas en la domparlamento la lernant-konsilantaron, kiu prizorgas la necesajn teknikajn aferojn kun la lerneja administracio.

Dum tia 4-monata kurso evoluas komunumo, en kiu ĉiuj lernas unu de la alia, sciiĝas pri mizeroj k duboj de l' unuopaj, la spertoj kolektiĝas, dum komuna laboro en komuna mizero vekiĝas k fortiĝas la frata pensmaniero malgraŭ la diverstendenceco de l' kursanaro.

Nek ateston, nek privilegion, nenian disponeblan profiton vi ricevas, sed sciojn k eĉ tre profundajn. Kiam lerninto forlasas la lernejon, li devas kompreni pensi objektive k honeste, juĝi trankvile k prudente, senti juste k kuraĝe batali por la vivekzisto, ekkoni k estimi sian propran homan valoron en siaj rajtoj k devoj. Li ĉesas esti hazardulo, li estos tia, kia estas lia destino: ĝuste k forte kreskinta laŭ la klare ekkonita leĝo en la propra brusto — homo.

Detalajn informojn pri metodoj k celoj de la popol-altlernejo donas la lernejestro s-o Vajtŝ (Weitsch), *Volkshochschulheim Dreissigacker ap. Meiningen* (Thür.), Germanio.

SAT-ano 7046.
Partoprenanto ĉe la 19-a kurso.

[1] *Dreissigacker* (laŭ germ. ortografio).

tere kuŝanta viro. La studento restis kuŝanta svene.

Dum la pafado izola viro serĉis ŝirmon malantaŭ la *Anzengruber*-monumento. Polica inspektoro, kiu staris ĉe la angulo de l' parlamentejo, fusilcelis al tiu viro k eligis kontraŭ lin tri bone celitajn pafojn. Post la tria pafo la viro teren falis.

Sabate, je la dekoka horo s-ino Katerino Pokorni alvenis en *Kifŝtajngase.* Polica aŭtomobilo veturanta tra la strateto, subite haltis. La policanoj elsaltis k komencis subite bati per la kolboj la homojn, kiuj hazarde estis enstrate. Ankaŭ s-ino Pokorni ricevis baton per fusilkolbo sur la kapon. Ŝi teren falis senkonscia.

Je duono post la deksepa aperis subite en *Babenberger*-strato svarmlinio da policanoj, kiuj eligis salvopafadon kontraŭ *Rahl*ŝtuparon; unu viro restis kuŝanta morte, pluraj grave vunditaj.

Je duono post la dekkvina svarmlinio de policanoj aperis subite en *Folksgarten*strato k pafis en homamason, kiu estis kolektiĝinta antaŭ la germana popolteatro. La amaso forkuris en *Nojŝtiftgase* k estis tie akceptata denove de pafado. Parto forkuris poste en *Burggase,* kie oni tuj denove ekpafis al ili. Maljuna viro, trafite en la ventron, teren falis.

La 16-an de julio, je la 21-a horo, homoj en malgrandaj grupoj staris kune antaŭ la pordegoj de siaj domoj en *Hüteldorfer*strato, angulo *Rajnl*strateto parolante pri la okazintaĵoj de la 15-a de julio. Jen subite du aŭtomobiloj kun policanoj veturis rapidege laŭ Hüteldorferstrato supren. Je ambaŭ flankoj de la aŭtomobiloj vidiĝis elstarantaj pafiltuboj. Kiam la dua polica aŭtomobilo pasis ĉe la tramvoja haltej-dometo je la kruciĝo de la tramvojlinioj deka k kvardeknaŭa, la policistoj eligis salvon el la veturanta aŭtomobilo. La deksepjara helpisto *Ŝvarcer* mortfalis kun teruraj kapvundoj. La reprezentanto *Müller* ricevis pafon en la abdomenon. Tiaj kruelaĵoj k ankoraŭ multege pli okazis en Vieno la 15-an k 16-an de julio 1927.

(Daŭrigota.)

K-doj! Zorgu, ke gazetoj enpresantaj viajn tradukojn el "S-ulo", nepre menciu la fonton!



Redakcia adreso: A. SCHWARZ, Lerchenstr. 14
Neckarsulm (Germanio).

La dana junularo k la milito

Ĉe la mallarĝaj marzonoj, kiuj interligas la Nordan Maron kun la Balta, kuŝas Danio, laŭ mondpolitika signifo grava loko. Pli k pli la okuloj direktiĝas kontraŭ Sovetio, la ejo por estonta mondkatastrofo, k Danio regas super unu el la plej gravaj vojoj tien kondukantaj. Estas do certe interese iom scii pri la sinteno de l' dana junularo al milito.

Kiel en ĉiuj kapitalistaj landoj, same en Danio la infano jam en la lernejo estas militisme preparata. Oni ekz. instruas laŭ histori-libroj, kiuj gloras la militojn k iliajn "heroojn", kantas ŝovinismajn kantojn ktp. En geografia lernolibro sub "Sovetio" — ne, mi mensogas, sub "Ruslando" oni legas pri kanibalismo, dum — laŭ la libro — Aŭstralio, angla kolonio, havas kvazaŭan socialistan registaron!

"Kun dio por la dana junularo" estas la devizo de unu el la plej malnovaj danaj knaborganizoj: F. D. F., libervola knabunuiĝo. La devizo montras, ke ĝi estas kristan-ŝovinisma; sed al ĝi laboristaj gepatroj dum multaj jaroj sendis siajn filojn! Poste aperis ankaŭ la skolta movado, kiu ĉi tie certe rekrutas sian anaron ĉefe inter burĝidoj. — Dum la lastaj jaroj tre progresis la socialdemokrata infanmovado, kiu edukas la infanojn en pacisma senco. Ankaŭ ekzistas komunista pionirgrupo en Kopenhago.

La dana junularo kiel tuto estas kaptita de la piedpilka aŭ alia sportidiotismo. La restoracioj k kinejoj estas plenplenaj de junularo, ne malplej de laborista junularo. Ĉi tiuj junuloj neniam serioze pensis pri la milito, nek pri io ajn alia. Ili estas facila kaptaĵo por la milit-estroj. Sed kompreneble ekzistas ankaŭ en Danio agemaj junuloj, kiuj ekvidis la abomenon k kruelon de l' milito k kiuj sekve laboras por malebligi la militon.

Mi volas dividi ĉi tiujn junulojn en du ĉeftendarojn: unu, kiu laboras laŭ nepolitika vojo k alia, kiu volas solvi la probelmon pere de politiko. Inter la unuaj mi rimarkas la "Neniam-plu-milito"-anojn, kiuj apartenas al la t. n. "ekstremaj pacistoj". Ili lastatempe tre progresis (1929: 304 anoj — 1930: 610) k iliaj klopodoj jam donis iomajn fruktojn, ĉar en la gazetoj aperis notoj jen pri unu militservo-rezistanto, jen pri alia. Ni rimarku, ke en Danio estas deviga militservo, kiun la N. P. M.-anoj volas forigi per militserva rezisto. Persone mi tre simpatias kun ili, ĉar mi ne libervole subiĝas al la burĝaro. Tamen mi kredas, ke neniam ni tiele atingos la pacon. Ĉiam la militserva rezisto nur povas esti *pasiva, individua* ago. Eĉ se aperus sufiĉe multaj rezistantoj por influi la registaron (pri kio mi dubas!), tiel ke deviga militservo estus forigata, ni ne estus atingintaj nian celon.

Laŭ politika vojo la *junaj socialistoj* volas solvi la problemon. Ili subtenas la programon de l' dana socialdemokrata partio pri "izolita malarmado". Sian sinceran kontraŭmilitismon ili montris nunan someron dum la skandinava junsocialista kongreso en Kopenhago, kie ili samtempe aranĝis kontraŭmilitisman ekspozicion. (Parte la ekspoziciaĵoj estis prunteprenitaj de ŝtata armildeponejo!). I. a. oni vidis sterkejon, konsistantan el malnova dannacia standardo, ŝovinismaj literaturaĵoj k. s., super kiu flirtis la venkontaj "sovetinsignoj" (laŭ burĝa gazetaro).

Kiel vi komprenas, ambaŭ, ekstremaj pacistoj k junsocialistoj, akcelas forigon de la militserva devo, kio, kvankam ideala, miaopinie, ĉiam restas *pasiva, persona agado.* Estas nerefuteble ideale kontraŭi devigon de la nuna kapitalisma reĝimo, sed ĉu tiel la socia flanko de l' afero estas solvebla? Mi estas bedaŭrinde tiom pesimisma, ke mi ne kredas tion. Kiam estos forigata la militserva devo, la burĝaro (ŝtato) kompreneble ekstarigos novan armeon — ĝendarmkorpusojn, k ĉie en la eksterlando mi spertis, ke por la laboristaro ĉi tiu estas multe pli danĝera ol deviga armeo. Do, fine restas nur unu vojo irebla por atingi nian celon, vojo neniam praktikita en Danio, la komunista: "Propagandu inter la armeo, tiel ke ĝi en iu momento direktos la armilojn kontraŭ la veran malamikon!" Nur post tiu ĉi *aktiva, socia agado,* post la revolucio, la militproblemo estos solvita.

H. Nilsen (11 082)

Nia poŝto. — 14 981. "Je la servo de l' partio" aperos en sekv. n-o. Daŭrigu kunlaboron. *7514 (Ilgner).* Certe kun granda ĝojo ni akceptas vian praktikan kunlaboron. Bonv. verki pri "junularo k altlernejo". Ĉiu taŭga helpo bontrafas. Saluton. *A. S. 10 637.* Via artikolo alvenis tro malfrue por tiu ĉi n-o.

Iom pri la SAT-junulara kunveno okaze de l' Kongreso en Londono

La kunveno de l' SAT-junularo en Londono komence tre seniluziigis min. Ĝi estis fuŝita pro tio, ke neniu el la sekretariaro ĉeestis k nenia raporto, nek de K-do Keŭning, nek de aliaj prirespondul oj. Se ni estus havintaj la raportojn aŭ la rezolucion verkitan k akceptitan dum la 9-a Kongreso en Lajpcigo, ĉiuj ĉeestintoj havus klaran bildon pri la SAT-junularo k ĝia laboro farita k farenda. Oni ne estus devigita interrompi kelkajn Gek-dojn dum ilia parolado, ĉar ili deflankiĝis de l' SAT-vojo. La interrompo certe ne entuziasmigis ilin. Ŝajnas, ke la sekretario perdis sian entuziasmon aŭ ne estas konscia pri sia tasko[1].

Nu, la manifestacio de l' junuloj dum la kongresa adiaŭvespero certe postlasis bonan impreson ĉe la alestintaj SAT-anoj k neesp-istoj. Ĝi rekontentigis tiujn gejunulojn, al kiuj ŝajnis la adiaŭvespero (pro la dancado) iomagrade burĝeca, ne SAT-inda. La manifestacio montris, ke per kunlaboro de ĉiuj granda sukceso estas akirebla, sed ne per la skismemo de partifanatikuloj. Ni SAT-gejunuloj ĉiam penu liberigi nin el ĉiaj dogmoj, naciaj, eklezia j k partiaj. Ni estu konsciaj pri tio, ke la junularo estas portanto de l' estonto. Tial mi vokas al ĉiuj esp. gejunuloj: Propagandu nian lingvon ĉe ĉiu trafa okazo, varbu en la vicoj de l' diverstendencaj prol. junularoj. Klarigu la valoron de esp-o k montru al ili la vojon al la verdruĝa stelo k SAT. Por tiu tasko streĉu la fortojn k raportu venontjare, por ke dum la 11-a nia kunveno ne aspektu kiel la lasta. Ni voku el profundo de l' koro: "Proletaj gejunuloj ĉiulandaj unuiĝu sub la standardo de SAT!"

B. Weber (14 909), Mainz.

Migrulo varbas bonsukcese

13-an de sept. devis okazi la ĉiujaraj sportkonkursoj inter Bradfordaj k distriktaj junlaborpartianoj en Denholm Get (*Denholm Gate*) apud Bradford; sed pro malbela vetero ni kunvenis ĉe esp. K-dino. La junsocialistojn tre interesis la ĉeesto de K-do Veber (*Weber*) el Germanio. La plej multaj neniam antaŭe havis okazon konatiĝi kun fremda K-do k ĉagren-

[1] La afero estas klarigita en n-o 312, pĝ. 551. — A. S.

TRA ESPERANTIO

INTER NI

Ne malofte verkistoj prenas kiel temon, montri, ke se Jesuo Kristo revenus surteren, li tute ne rekonus la papon kiel sian disĉiplon k ĉefreprezentanton. Ankaŭ la grandegan plimulton el la pastroj li ne agnoskus kiel kristanojn. Li trovus eble kelkajn laŭspirite disĉiplojn inter simplanimaj proletoj, kiuj neniam vizitas preĝejon, sed kondutas bonkore, paceme k solidareme al siaj samsortanoj. Tiajn virtojn oni trovas ne nur ĉe homoj, sed ankaŭ ĉe bestoj el kelkaj specoj. Ili do ne rezultas de kateĥizado k lernado el dikaj libroj bibliecaj, sed de natura sento k neceso trudita de la vivo mem.

Oni ja facile povas prezenti al si iun Jesuon, kiu denove per forta mano svingus vipon por peli el la temploj la parazitajn pastrojn k bibliparkerantojn. Estus bela spektaklo, kiun ĝoje rigardus liberpensuloj.

Image k ĝue vidante tiun spektaklon, subite aperis antaŭ mi iu alia k preskaŭ simila. Mi vidis K. Marks, elsaltinte el sia tombo, kiu batis sur la postaĵon al aro da t. n. "marksistoj", pli malpli freŝe bakitaj, k kiuj volis ekskomuniki je lia nomo.

"Ha, bubaĉoj, li diris, ĉu tiel vi komprenas mian instruon? Kial vi provas fari el ĝi dogmon? Ĉu do vi nur kapablas papage ripeti, kion mi diris? Estas vera honto, ke vi provas fari el miaj verkoj novan biblion. Vi tute ne estas miaj disĉiploj k mi ne toleros, ke vi pastrumu kun la "Komunista Manifesto" en la mano k diru, ke ĉi tiu aŭ tiu ne estas "marksisto".

"Silentu! . . . ne ridindigu vin k min per viaj aplombaj asertoj, ke nur vi predikas marksiste. Neniam mi celis starigi novan kvazaŭan religion k ĉefe kun tiaj pastroj, kiaj vi estas. Lernu unue pensi per via propra cerbo. Kaj se okazos, ke studante la n u n a n *socion, vi alvenus al konkludoj eble ne tute samaj kiel miaj, kiujn mi faris antaŭ multe da jaroj, tiam mi eble konsentos, ke vi nomu vin "marksistoj". Mi lasis al vi ne dogmo, sed nur esplormetodon, dialektikan ilon, kiujn vi ne sukcesis lerni k uzi trafe k ĝuste.*

"Mi eĉ volas fari publikan konfeson: pento eniris mian konscion ĉe la memoro, ke mi mokis al Prudon pro tio, ke li interesiĝetis pri lingvo internacia. Estas vere, ke tiu aŭtoro ne havis specialan aŭtoritaton por pritrakti la demandon. Almenaŭ pri ĝi li okupiĝetis, dum mi nur scipovis moki . . . Konsilante al la laboristoj el ĉiuj landoj, ke ili unuiĝu, mi malatentis, ke por tio necesas unue interkompreniĝi. Tia malatento estas grava manko, estas ia peko, pro kiu mi hodiaŭ pentas.

"Estas vere, ke por mia senkulpigo mi povas diri, ke la verkon de Zamenhof mi ne konis, kiam, antaŭ 83 jaroj, estis publikigata L a K o m u n i s t a M a n i f e s t o. *Sed hodiaŭ miaj plej aŭtoritataj disĉiploj ankaŭ ignoras la lingvan problemon. Tamen esperanto vivas k estas uzata de relative multaj proletoj. Kio estas pardonebla al mi, tio fariĝas neforigebla morta peko por la nuntempaj "marksistoj", kiuj ne lernas k ne utiligas la artefaritan tutmondan lingvon. Se mi povus mem proprokule vidi, ke proletoj vigle, pasie diskutas inter si dum kongresoj per artefarita lingvo, mi certe atentus tiun gravan fakton k kredeble prikonsiderus diversajn problemojn je iom alia vidpunkto ol mi faris . . ."*

Tiel parolis K. Marks. Lia eltomba voĉo forte sonis ĉe miaj oreloj. Mi ĝojis, kiam sarkasme li mokis tiujn homojn, kiuj scipovas nur citi el liaj verkoj, sed ne kapablas el ili ĉerpi ties riĉhavan nutran medolon — k tamen ne hontas aljuĝi aŭ rifuzi ateston pri "marksismo".

E. L.

Renovigante vian abonon

pensu ankaŭ pri via sovetia K-do, kiu povas konservi la kontakton kun SAT

nur per la legado de "S-ulo".

Abonu por li ĉe **Administracio de SAT!**

... iĝis, ĉar ili ne povis paroli al li. Ili plene okupis la tri ĉeestantajn esp. K-dinojn per tradukpetoj. Morgaŭon nia juna K-do migris kun junsocialistoj el Hebdn Briĝ (*Hebden Bridge*) k bone propagandis por esp-o inter ili. Ankaŭ preterpasantoj tre interesiĝis, aŭdante fremdan lingvon. En Hebdn Briĝ, ĉe hejmo de junsocialistino, K-do Veber tre bone demonstris kurson laŭ rekta metodo, k ĉiuj ĉeestintoj intencas daŭrigi la lernadon. Mi esperas, ke tial venontjare nia SAT-junularo iom plimultiĝos.

K-dino Eva Wilson (16 340),
Triangle (Britio).

Korekto. Multaj legantoj miris kredeble pri la uzo de du radikoj por sama termino en la artikolo "Pri negroj k imperi(al)ismo" (n-o 314), nome *Imperialismo* apud *Imperiismo.* Tiu nelogikaĵo estas rezulto de *malatento ĉe kompostistoj k korektistoj,* kiuj anstataŭ sekvi la manuskripton (en kiu estas uzita nur la formo *imperiismo*) fuŝtraktis la tekston laŭ propra arbitro. Espereble io simila estonte ne plu ripetiĝos! *Red.*

ALVOKO

La de s-o Ĉe elpensita k aplikita metodo de esp. instruo k la per ĝi atingitaj rezultoj vekis ne nur ĉe la neŭtraluloj, sed ankaŭ ĉe lab. esp-istoj grandan interesiĝon. Pri tio atestas i. a. la fakto, ke en Londono la de K-dino "Anjo Kolombo" donita provleciono de Ĉe-instruo altiris pli da ĉeestantoj ol iu faka kunsido.

Je la Dua Intern. Pedagogia Esp. Kurso okazinta antaŭ kelkaj monatoj en Arnhem, Nederlando, ĉeestis ankaŭ pluraj lab. esp-istoj. Ili samopiniis pri tio, ke instruo laŭ Ĉe-metodo, *adaptita al specialaj bezonoj de laboristoj,* nepre devas esti provata k eventuale enkondukata en laboristaj rondoj. Tiucele ili decidis kolekti opiniojn, spertojn ktp. de ĉiulandaj K-doj, kiuj partoprenis Ĉe-lecionojn, aŭ mem instruis laŭ tiu metodo, aŭ interesiĝas pri tiu afero.

Gek-doj, konigu al mi viajn opiniojn k spertojn. Ankaŭ informu min pri artikoloj tiutemaj aperintaj en naciaj lab. esp. gazetoj.

G. P. de Bruin,
G. J. van Heekstr. 140, Enschede, Nederlando.

Literaturo: *Sennacieca Revuo,* 1927—28, pĝ. 184; "S-ulo", n-oj 248, 253/254, 258, 259, 260, 316.

Radio — Holando

Regule ĉiudimanĉe matene la "Federacio de Lab. Esperantistoj Ned." disaŭdigas komunikojn holandlingve k esp-e de 9.15 ĝis 9.30 h., per la VARA-mikrofono (ondlongoj diversaj 298 — 1071 — 1875 m). Pri aŭdeblo k impresoj aŭskultintoj informu la sekretariejon: Jan van Galenstr. 251, II, *Amsterdam-W.;* sendu simpatiesprimojn al V.A.R.A., Postbus 50, Hilversum, Holando.

Laborista Olimpio k esperanto

La konferenco de l' Internacia Oficejo de la Socialista Sport-Internacio Laborista (SSIL) en Lucerno denove pritraktis sian sintenon al esp-o k akceptis sekvantan decidon: Konsiderante la fakton, ke la 2. Olimpio Laborista 1931 en Vieno estas subtenata de la 22 al SSIL aliĝintaj nacioj, la Oficejo de la Soc. Sport-Intern. Lab. atentigas pri la malfaciloj, kiuj estiĝas el la lingva ĥaoso. La internacia Oficejo alvokas la aliĝintajn landoasociojn k iliajn subasociojn k membrojn, akceli la lernadon de esperanto. La Sporta Komitato de SAT, adreso: Ad. Wendt, Leipzig O 27, volonte donos konsilojn k instigojn. Sekvu al la decido de Helsinki, lernu esp-on; ĉar sen esp-o ne eblas internacia interkompreniĝo.

Interparolo

— *Ĉu vi jam vidis la novan gazeton, la* B l e k i s t o-*n? Ĝi estas la "sola klasbatala . . . proletesperanto-gazeto".*

— *??!!*

— *La unua n-o ĵus aperis. Kaj mi certigas al vi, ke ĝi ne nur laŭte blekas, sed eĉ forte Bata-as . . .*

— *El kie venis la mono por tiu eldonaĵo?*

— *El kie? . . . Vi estas naiva . . . Ĉu do vi ne scias, ke en la kaso de C. K. de S.E.U. kuŝas 14 000 markoj apartenantaj al S.A.T.?*

— *Jes, mi scias; sed kian rilaton havas tio kun mia demando?*

— *Kian rilaton! Via blindo vere mirigas min. Ruzaj estas la blekistoj. Lerte ili aranĝis la tutan aferon: unue reteni la monon de S.A.T.; due venigi al Moskvo du blekistojn k provizi ilin per sufiĉe da mono por eldoni la unuajn n-ojn de la gazeto; trie per ĝi disbati SAT-on por starigi sur ĝia kadavro novan tute ortodoksan organizon . . .*

— *Sed tio estas ega, nekredebla friponaĵo! . . .*

— *. . . Nu, kial vi miras? Ĉu do vi ne konas la devizon de la blekistoj? "P e r ĉ i a j r i m e d o j . . ." Tiu pravas, kiu plej laŭte blekas . . .*

— *!!??!! . . .*

Aŭdinto.

TRA LA MOVADO ◆
KRONIKO

SOVETIO. (Ukrainio). La kleriglabora revuo de VUSPS (Ukr. Intersindikata Konsilantaro) "Kultrobitnik", kiu jam kelkajn jarojn enpresis neregule pri- k peresp-an materialon, depost okt. komencis presi kurson de metodiko por esp. kursgvidado k peresp-a intern. koresp-ado. La porgazetara organo de l' Ukrain. kompartio (*Ruĝa Gazetaro*), jam delonge presas peresp-ajn kompil-artikolojn; nun ĝia fratorgano "Rabselkor" komencis publikigi kurson por intern. lab. koresp-ado (Izgur). Peresp-an rubrikon ankaŭ enhavas la lab. ĵurnalo *Proletar* k la kamparana gazeto *Radjanske Selo*, aperantaj en Ĥarkovo. — Fondiĝis *esp. sekcio* ĉe ukraina eldonejo *Plugilano*. La popolkomisaro por klerigo subvenciis ĝin per 500 rbl. 3 traduk-eldonoj jam estas planitaj. Por diskonigi ukrain. prol. verkistojn, fondiĝis peresp-a prolet-literatura Servo. En ukrainlingva romano *Kvint* (aperonta) ludas grandan rolon esp-apliko, preskaŭ ĉiuj romanfiguroj estas esp-istoj, k ankaŭ troviĝas en ĝi multaj esp. tekstoj. La Ŝtateldonejo reeldonis broŝuron de Gluŝĉenko (*Ni estas KJI-anoj*). Biblioteko por Intern. Eduko eldonis poresp-an broŝuron de Izgur k libron pri intern. junul-edukado, rekomendanta esp-on. Ankaŭ lerniloj denove aperos ĉi-vintre en tiu eldonejo. La Kremenĉuga distriktkomitato de junkomunistoj publikigis broŝuron pri peresp. spertoj. Ukrainia "Ruĝa Helpo" decidis aperigi kurson en sia organo k rekomendis aplikon de esp-o. Rezoluciojn por esp-o akceptis la Intersindikata Kulturkonferenco (jul. 1930). Intersindikata eldonejo kunmetis 250 pri- k por-esp. biblioteketojn k transdonis al kluboj. Ekspozicio en Kremenĉug pri *intern. peresp-a koresp-ado* okaze de XI. Partikongreso ukr. havis grandan sukceson. Eĉ la kutime tre skeptike al esp. rilatanta junkom. centra organo ("Koms. Pravda") raportis pri ĝi tre favore. Oni intencas rondirigi la ekspozicion en vintro tra Ukrainio. La disaŭdigoj esp-aj de l' Ĥarkova radio-stacio daŭras jam 11 monatojn. Aliaj stacioj malregule dissendas esp-e. En *lingvaj superlernejoj* (fonditaj nun en pluraj urboj) esp-o estas enkondukita en nova lernjaro laŭ decido de l' kleriga komisaro (60 lernhoroj por la unua, 30 por la dua jaro). Dum 1931 la Ukrainia Komitato de SEU intencas atingi 80 filiojn lokajn kun 3000 membroj. — V. K.

POR EVITI LA ▲ RIFON

6. LISTO:

Lea, 12 638 (Manchester) . .	2.— mk. g.
Kolektita de Grupo "Zamenhof", sekcio Amsterdam V de la Federacio de Lab. Esp-istoj en la regiono de la ned. lingvo	11.— guld.
Roux, 132 (Lyon)	25.— fr. fr.
Louzon, 5064 (Alger)	10.— „ „
Beiermann (Bielefeld)	1.80 mk. g.
SAT-Junularo (Leipzig) . . .	15.— „ „
Nicollet (Lyon)	5.— fr. fr.

MEMORNOTO ◆

Priesper. artik. k notojn enhavis:

Münchener Post (k. 4—6 al. socialdem. gazetoj bavariaj), 20. 8., 23. 9., 30. 9., 8. 10., *Rebelion,* Madrid, 11. 10. (rubriko en esp-o), *Signalen,* Stokh., 9. 10., *Le Cri Populaire,* Bordeaux, 31. 8., *Le Rappel du Morbihan,* Lorient, 6. 9., *L'Effort Social,* Angers, 6. 9., *L'Ardèche Socialiste,* Privas, 7. 9., *Le Travail,* Oudjda, 6. 9., 27. 9., *La Montagne,* Clermont-Ferrand, 7. 9., *Le Jura,* St. Claude, 13. 9., 27. 9., *Le Travail,* Cahors, 14. 9., *Le Drapeau Rouge,* Clermont-Ferr., sept., *Le Populaire Marocain,* Kenitra, 7. 9., *Sport & Socialisme,* Liége, 18. 9., *L'Eveil Breton,* St. Brieuc, 7. 9., 5. 10., *Le Socialiste de la Haute-Saône,* Vesoul, 13. 9., *L'Effort du Berry,* Issoudun, 27. 9.

Pri SAT-Kongreso raportis:

Metallarb.-Zeitg., Berlin, n-o 39.



NIA POŜTO ◆

15 700. — Via manuskripto estos uzata.

I. M. (Lodz). — Via materialo aperos, almenaŭ parte.

13 293. — Ni uzos nur en okazo de bezono; ni havas multan similan materialon. *Red.*

14 751. — Viaj senditaj 5 rubl. estas senvaloraj por ni. Eble iu aĉetas ilin k tiam, ni daŭrigos la abonon. Kiu aĉetos ilin po 2 mk. g.?

10 504. — Ni regule sendas al li "S-ulo"-n.

Al Sovetianoj. — Multaj plendis, ke ili ne ricevis la n-ojn 310, 311, 312 de "S-ulo". Tamen ni regule ankaŭ sendis ĉi tiujn n-ojn. *Adm.*

KORESPONDADO ◆

ĈEĤOSLOVAKIO

K-do Vaclav Zikovsky (magazenisto), Táborská 342, *Praha-Michle,* kĉl, pri socialproblemoj, L, PI.

Soldato Josef Grospic, lim-bataliono n-o 1, 2. grupo, *Podmokly,* kĉl.

GERMANIO

— 10 gelernantoj de esp. en la aĝo de 18 ĝis 24 jaroj koresp. kĉl. Resp. garantiata. Adr.: K-do Fritz Wagner, *Hainewald/Sa., 293.*

K-do Lorenz Dörr, Rabenstein 6, *Ansbach (Bay.),* kĉl, pri ĉ. temoj, L, PK, PI, esp-aĵoj. Certe resp.

K-do Walter Beckert, Schandauer Str. 56, *Sebnitz/Sa.,* kĉl, pri ĉ. temoj.

— Juna germano dez. koresp. kun Turkio, Italio, Ĉinio, Sud-Afriko, Usono, Aŭstralio k Balkanlandoj. Adr.: Ferdinand Anlauf, Lindenstr. 20/I., *Rabenau/Sa.*

K-do Rudi Naumann, Wartburgstr. 31/III., *Dresden-A. 19,* kĉl, pri ĉ. temoj, bfl.

HUNGARIO

K-do Francisko Veuger, Csokonay-str. 11, *Ujpest,* kĉl, pri ĉ. temoj. Resp. garantiata.

— Lab. Esp. Grupo koresp. kun esp. grupoj ĉl., pri ĉ. temoj. Adr.: Esperanto-Grupo, Kolozsvári-u. 55, *Ujpest.*

K-do Georgo Vereska, Guttenberg-u. 3, *Békéscsaba, IV,* kĉl, pri ĉ. temoj.

NEDERLANDO

— 10 gelernantoj koresp. kĉl, pri ĉ. temoj facilaj, L, PK, PI. Resp. garantiata. Adr.: P. J. Kleineveld, 3-e Nauwsteeg, 21, *Delfto.*

LETERVESPERO!

Ĉiuj Gek-doj estas elkore petataj, sendi saluton al nia letervespero, okazonta la 21. januaro 1931. Adr.: Klubo Esperantista "La Tagiĝo", Box, 36, B o r a s (Svedio).

Atentu! ★

Novfondita LEA-grupo serĉas kolektivan koresp-adon kun liberpens., sportaj, politikaj, metallab., sindikataj rondoj pri ĉ. temoj. Interŝ. afiŝojn, gaz., flugfoliojn ktp., L, bfl. Certe resp. — Adr.: Max Schade, Gabelsbergerstrasse 157-k, S t r e h l a / E l b e (Germanio).

ENHAVO

	paĝo
Bandita agado en Usono	**33—34**
A. B. F. — Kleriga Asocio de Laboristoj en Svedujo	**34**
La klasbatalo tra la mondo . . .	**35**
Sovetio estas areno de grandioza konstruado	**35—36**
La revolucio en Brazilio	**36**
Havi kuraĝon, riski la vivon . . .	**36—37**
Memoro je la 15-a de julio en Vieno	**36—37**
10-jara ekzisto de la popolaltlernejo Drajsigaker (Tridekkampo) en Germanio	**37**
Junulara Paĝo	**38—39**
Tra Esperantio	**39—40**
Korespondado, Anoncoj	**40**

Presejo: Peuvag, Druckerei-Filiale Leipzig (Germanio)